# *Vizitis Kubon la ?efministro de Gvineo Bisao*



La unua vicprezidento de la ?tata konsilantaro de Kubo,  Miguel Díaz-Canel, renkonti?is en Havano kun la ?eministro de Gvineo Bisao, Domingos Simoes, kiu plenumis ocifialan laborviziton en la insulo.

Amba? asertis ke la solidaraj rilatoj establitaj en 1973 bone progresis kaj esprimis la volon kunlabori en diversaj laborkampoj, nome sano, edukado kaj agrikulturo.

La ?efmimistro vizitis diversajn interesajn lokojn kiel la centro por ?tata kontrolo de medikamentoj, ekipa?oj kaj medicinaj elementoj (CEDMED), espriminte sian impreson pro la evoluo atingita de la insulo en la esplorkampo kaj pro la sinofera kontribuo en aliaj landoj.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/40570-vizitis-kubon-la-cefministro-de-gvineo-bisao

**Radio Habana Cuba**